



# *Esperanto en Danio*

10-a jarkolekto

3/2003



Danaj partoprenantoj de UK en Gotenburgo

## Esperanto en Danio

membroorgano de  
Dana Esperanto-Asocio  
ISSN 0909-6124

### Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder  
Vestavej 4, 2770 Kastrup  
☎ 32 54 93 54  
✉ [dea@esperanto.dk](mailto:dea@esperanto.dk)  
Ĝirokonto: 805 7370  
UEA-kodo: deaa-t

### Kromaj estraranoj:

Bent Wiinberg (vicprezidanto)  
Ina Schultz (kasisto)  
Jytte Sunekær (sekretario)  
Ole Blaust  
Werner Madsen  
Torben Svendsen

### Anstataŭantoj:

Bent Jensenius  
Ana Røssum

### Redakcia adreso:

Jens S. Larsen  
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77  
2770 Kastrup  
☎ 54 82 95 86  
✉ [eed@esperanto.dk](mailto:eed@esperanto.dk)

### Presado:

Atlas-Quick

### Adresŝanĝoj al:

Ina Schultz  
Bredagervej 21, 3.th., 2770 Kastrup  
☎ 32 52 19 58.  
✉ [ina.schultz@get2net.dk](mailto:ina.schultz@get2net.dk)

**Represo de artikoloj el EeD  
estas permesata kun indiko de la  
fonto.**

**Limdato por la venonta numero:  
10.10.2003**

## Enhavo

La unuaj cent tagoj..... 3  
“Ĉu Esperanto do ankoraŭ  
ekzistas!”..... 4

## Lande

Informa strategio de DEA.. 5  
Nekrologoj..... 9

## Monde

Komitatanaj impresoj  
pri la UK..... 10  
La Komunikadcentro bezonas  
vian helpon!..... 13  
Lingvo, politiko kaj kulturo 14  
Travivaĵoj en fervojista  
kongreso..... 16

## Loke

Kopenhago..... 18  
Fonduso Esperanto-Domo..... 18  
Invito al kopenhagaj prelegoj.... 19  
Kunvenoj dum aŭtuno 2003..... 20  
Budo en la karnavalo..... 21  
Næstved..... 22  
Århus..... 23  
Anoncoj..... 26

## La unuaj cent tagoj

En politikaj sferoj estas kutime analizi la rezultojn iom da tempo post la elekto, kaj kial do ne fari tion ankau en nia organizo? Mi priskribos kion ni atingis dum la proksimume 100 tagoj de la laboro de la nova estraro.

Jam estas tradicio ke DEA havas informbudon sub la gvido de Kim Henriksen dum la pentekosta karnavalo en Kopenhago. 600 flugfolioj pri Esperanto estis disdonitaj, kaj mi parolis kun pluraj interesitoj, kiuj deklaris ke ili volas eklerni la lingvon partoprenante aŭtunan kurson.

Unu el la gravaj taskoj estis trarigardi la bilancon kaj la buĝeton por tiu ĉi jaro. Ni konstatis ke ni ankaŭ ĉi-jare verŝajne havos deficiton, kaj devos esti ŝparemaj kaj singardaj pri la elspezo de niaj monrimedoj. Unu el la plej multekostaj elspezoj estas nia membro-organo Esperanto en Danio, kaj ni decidis nur eldoni 4 numerojn jare



*La redakcia teamo:  
Jens, Ana kaj Torben*

kaj diskutis ĉu eldoni EeD kun frontpaĝo en nigra koloro, por fari la presadon pli malmultekosta. Samtempe la redakcio de Esperanto en Danio kunvenis plurfoje por diskuti la solvon de teknika redaktado kaj presado, ĉar nia ĝisnuna presejo ne povas daŭrigi tiun laboron.

Alia grava tasko estas informado, kaj la estraro aprobis nian novskribitan informan strategion kiun vi povas legi en tiu ĉi numero. Fine de majo Ib Sunekær pro malsano demisiis kiel prizorganto de Libroservo, kaj tre bedaŭrinde li fine forpasis la 5-an de julio, kaj ni ĉiam rememoros lian gajan optimistan agemon kaj sindonemon. Ni trovis novan prizorganton: Arne Casper kiu feliĉe por DEA akceptis la taskon.

Pliaj gravaj taskoj atendas la laborforton de la estraro dum la proksima aŭtuno, kaj mi persone planas kaj esperas havi eblecon viziti la diversajn klubojn.

*Ileana Schrøder*

## “Ĉu Esperanto do ankoraŭ ekzistas!”



– mi pensis, ekvidinte la malgrandan flugfolion en la loka biblioteko en Brønshøj. Mi ĉiam pensis ke la ideo de neŭtrala internacia lingvo estas bonega. Dum la antaŭaj 30 jaroj mi ne vidis aŭ aŭdis la vorton Esperanto. Nun mi eklernis la lingvon kaj, kun surprizo, eksciis ke okazis Universala Kongreso ĉi tie en Kopenhago kaj ankaŭ Kultur-festivalo de Esperanto en mia propra urbo. Ĉu vere mi dormadis dum la lastaj 30 jaroj? Ĉu mi iradis portante okulŝirmilojn?

Tage mi instruas la anglan kaj danan lingvojn en teknika lernejo en la edukado por elektristoj. La lernantoj estas 20-ĝis 40-jaraĝaj. Por eltrovi kiel konata estas Esperanto, mi verkis malgrandan ekzercon de vortdifinoj, interalie de la vorto “Esperanto”. Mi konstatis ke la lernantoj ĉirkaŭ 40 jaroj ĝenerale konas la vorton. Sed inter la junuloj fakte 19 el 20 ne konas la vorton “Esperanto” (kaj ili ne scias ke ekzistas artefaritaj lingvoj). Kelkaj provis fari difinon de la vorto Esperanto, ekzemple: kopio, maniero fari kafon, ia pico, io travidebla, kaj erotika trinkaĵo.

Tamen, oni devas rigardi la aferon pozitive. Ekzistas en la juna generacio granda perspektivo koncerne Esperanto, se nur ili ekscios ke ĝi ekzistas. Multaj el la pli maljuna generacio supozas ke ĉiuj junuloj bone scias la anglan, sed laŭ mi tio estas ofte troigita. Oni povas aŭdi amason da rokenrolo, vidi multege da holivudaj filmoj kaj ludi amason da komputilaj ludoj, ne lernante multe de la lingvo. Mi mem surpriziĝis pri tiu fakto.

Por ilustru la problemojn pri lernado de la “granda internacia lingvo” mi povas menciigi ke kelkaj miaj kolegoj instruas la fonetikan alfabeton kiel neceson por lerni la anglan. Mi ne. Mi jam de longe rezignis pri tio.

Ŝajnas al mi ke multaj el niaj lernantoj jam uzis tiom da tempo por “lerni” la anglan ke ili preskaŭ ne kapablas plu. Sed multaj havas intereson pri aliaj “ekzotikaj” lingvoj kiel ekzemple la hispana. Eble ili ankaŭ trovos Esperanton ekzotika kaj interesa.

*Bent Jensenius*

## Informa strategio de DEA

La plenumado de ĉi tiu Strategio devas realigi la celon de la Asocio: disvastigi la konon pri kaj la uzadon de Esperanto, pere de kontaktema kaj aktiviga informa laboro. La strategio estas ankaŭ kontribuo al la Strategia Laborplano de UEA 2001/2010 (vidu ĉe la retejo de UEA, paĝadreso [uea.org/dokumentoj/laborplano](http://uea.org/dokumentoj/laborplano)).

### 1. Kampoj kaj niveloj

La Strategio koncernas jenajn agadkampojn:

- ekstera danlingva informado pri Esperanto al la larga publiko pere de amaskomunikiloj,
- informado al lernantoj pri la aktuala stato de la Esperanto-movado (instruado),
- la Esperantlingva informfluo de la Asocio al membroj (utiligado).

Ĉiuj tri kampoj de agado estas gravaj sur ĉiuj tri el la loka, landa kaj internacia niveloj; tamen ĉiu agadkampo havas apartan gravecon sur aparta agadnivelo:

- La ekstera informado al interesuloj koncernas unuavice la landan nivelon de agado, kaj do estas la plej grava agadkampo de la Asocio. Tiel estas ĉar ne temas nur pri disvastigo de abstrakta, universale valida mesaĝo, sed ankaŭ pri adapto al lokaj konkretaj imagoj pri lingvo kaj internacieco.
- Je la loka nivelo aparte gravas la informoj pri instruado; leteraj kaj retaj kursoj estas bona suplemento, sed kursoj kie homoj vive renkontas unu la alian en konata loka medio estas entute la ĉefa ekzistokialo de lokaj kluboj. La kunlaboro inter la lokaj kluboj kaj la Asocio do devas aparte atenti la bezonojn varbi lernantojn.
- En malgranda, riĉa kaj libera lando la aplikado de la Internacia lingvo havas nur limigitan daŭran intereson, se ĝi ne okazas je internacia nivelo. Tial la kunlaboro de la Asocio kun najbarlandaj kaj

internaciaj Esperanto-asocioj precipe koncentriĝas al informoj pri eventoj kaj servoj kiuj interesos ankaŭ eksterlandajn esperantistojn.

Estas grave agadi en ĉiu agadnivele.

## **2. Celgrupoj kaj kunlaborantoj**

La Strategio distingas inter "celgrupoj" kaj "kunlaborantoj". La celgrupoj konsistas el interesuloj, lernantoj kaj membroj. La kunlaborantoj estas tiuj aliaj organizaĵoj kaj personoj, kiuj helpas realigi la celojn de la Asocio.

Neesperantista organizaĵo povas aperi kaj kiel celgrupo, kaj kiel kunlaboranto. Se tia organizaĵo estas celgrupo de la Asocio, la Asocio konsentas esti inter la celgrupoj de tiu organizaĵo, ekemple per reciproka kolektiva membreco.

### **Celgrupoj**

- Membroj: pagas kotizon al la Asocio
- Kursanoj: aliĝis al Esperanto-kurso
- Apogantoj: ne deziras mem lerni la lingvon sed apogas la movadon
- Interesuloj: estas pozitivaj pri Esperanto, kaj eble volas lerni ĝin
- Similcelaj organizaĵoj: ĝis nun nur DUNA (la Dana UN Asocio, t.e. FN Forbundet)
- Amaskomunikiloj.

### **Kunlaborantoj**

- Membroj kaj apogantoj, precipe studentoj, instruistoj, ĵurnalistoj
- Aliaj danaj Esperanto-organizaĵoj: DEFA, UFFE, lokaj grupoj
- Najbarlandaj kaj internaciaj Esperanto-asocioj: SEF, GEA, NEL, UEA, TEJO k.a.
- Organizaĵoj: DUNA.

La celgrupoj kaj kunlaborantoj estas listigitaj laŭ graveco en la informa laboro. Unu el la plej gravaj grupoj estas la individuaj aktivuloj, precipe tiuj kiuj estas en bona pozicio por informi kvalifike al multaj homoj.

### 3. Komunikaj kanaloj

Ĉiu membro rajtas propranome kontribui al la publika debato, precipe interne sed ankaŭ ekstere de la Asocio. Nome de la Asocio komunikadas kutime nur la prezidanto, aŭ persono delegita de la prezidanto, ĉar la eldiroj devas esti laŭeble plej kvalifikitaj. Eldiroj okazas sub respondeco antaŭ la Asocia estraro.

Oni povas dividi la komunikajn kanalojn en tri grupojn: personaj (kiuj postulas personan ĉeeston de aktivulo), surpaperaj kaj elektronikaj (radio, televido, interreto). En aldono al ĉi tiu strategio troviĝas skema superrigardo de la rilatoj inter la plej gravaj komunikaj kanaloj, celgrupoj kaj kunlaborantoj.

#### Personaj kanaloj

- Insignoj: la Asocia estraro rekomendas al ĉiu membro porti sur sia vestaĵo videblan, sed diskretan Esperanto-signon.
- Prelegoj: en institucioj, universitatoj, lernejoj, studentaj organizaĵoj, kunlaborantaj asocioj.
- Intervjuoj: en gazetoj, radio, televido. Precipe telefon-programoj en la radio estas facila kanalo por informi pri Esperanto.
- Ekspozicioj: kun abunda ekspozicia materialo montranta la kulturen valoron de la internacia lingvo. Taŭgaj ejoj: institutoj, lernejoj, bibliotekoj k.s.

#### Surpaperaj kanaloj

*Esperanto en Danio* (EeD) estas la esperantlingva membroorgano de la Asocio. Ĝi informas pri klubaj aranĝoj, iniciatoj de la landa estraro kaj gravaj okazaĵoj en la internacia Esperanto-movado. Ĝi estas servo al la membroj kaj funkcias kunlige al la tuta dana Esperanto-movado. Krome ĝi estas informfonto al alilandaj esperantistoj pri la Movada evoluo en Danio.

*Esperanto-nyt* (E-nyt) estas danlingva revuo kun aktualaj informoj pri la esperantaj lingvo, kulturo kaj movado. Ĝia celgrupo estas unuavice interesitoj kaj komencantoj, krom organizaĵoj kun celoj similaj al tiuj de la Asocio.

*Gazetaraj komunikoj* estas dissendataj al intereseblaj danaj amas-komunikiloj okaze de gravaj danaj Esperanto-kunvenoj, Esperanto-eventoj,

deklaroj de UEA k.s.

*Ĝenerala faldfolio* kun enkonduko al la lingvo, uzebla dum jaroj. Eventuale simila al "Opdatering om Esperanto", teksto tradukita el Esperanto, ĝisdatigata de UEA.

*Kursa faldfolio* kun informoj pri aktualaj kurseblecoj, renovigata ĉiujare en intima kunlaboro kun la lokaj kluboj.

*Libroj*: "Esperanto lingvistisk set" de John Wells kaj "Sprog og sprog imellem" de Preben Bagger.

*Anoncoj* en nacilingvaj gazetoj kaj periodaĵoj, mallongaj informoj kaj sciigoj, pli longaj en interŝanĝo kun similcelaj organizoj.

*Artikoloj* en fakaj revuoj, aŭ en gazetoj kaj magazinoj.

*Dokumentado*: la Asocio tenas arkivon de gazeteltondaĵoj kun artikoloj kaj eldiroj pri la internacia lingvo presitaj en danaj gazetoj.

## **Elektronikaj kanaloj**

Ekzistas baze du formoj de retaj informfontoj: hejmpaĝo, per kiu la interesuloj mem elserĉas la informojn, kaj retpoŝta dissendolisto (retgrupo), per kiu la abonantoj (membroj de la Asocio kaj aliaj interesuloj) interŝanĝas informojn kaj opiniojn. La respondeco pri la retaj informfontoj de la Asocio estas asignita al unu estrarano, kiu povas kunlabori kun membroj-neestraranoj.

La Asocio strebas kiel plej eble, ke revuoj, komunikoj, faldfolioj k.s. estu atingeblaj interrete en la hejmpaĝo de la Asocio.

*Hejmpaĝo*: [www.Esperanto.dk](http://www.Esperanto.dk) estas la retadreso de la Asocio. Ĝi posedas la rajton al la domajnomo Esperanto.dk kaj principe povas enhavi ĉion ajn interesan kaj rilatan al Esperanto, sed nepre devas esti simpla, plaĉa kaj dinamika. La informoj devas inkluzivi la adresaron de la Asocio kaj enkondukon en la lingvon, eventuale tutan retkurson. Krome ĝi funkcias kiel prezentilo al la cetera Esperanto-mondo, kaj ĉiuj organizaj informoj do devas aperi en dana lingvo kaj en Esperanto.

*Retkomunumo*: la Asocia retkomunumo nomiĝas Esperantodk kaj estas trovebla ĉe la adreso <http://dk.groups.yahoo.com/group/Esperantodk/>. Gastigas ĝin "Yahoo!", kiu fundamente estas hejmpaĝe bazita retpoŝta servo, sed antaŭ kelkaj jaroj englutis la dissendolistan servon "egroups". Pli detala danlingva priskribo de la retkomunumo troviĝas en aldono de ĉi tiu strategio.

*Akceptita de la estraro la 24-an den junio 2003*



# Nekrologoj

## Henning Hauge 09.07.1935 – 07.08.2003

Tragika aŭtomobilakcidento finigis eksterordinaran Esperanto-vivon.

Survoje hejmen kune kun sia edzino Sabine **Henning Hauge** estis tuj mortigita pro aŭtomobila akcidento en la vespero de la 7a de aŭgusto 2003. La detaloj ne estas tute klaraj, sed ili ja ne ŝanĝos la kruelan fakton. Al Sabine feliĉe sufiĉis rompita brako kaj aliaj ne tro gravaj damaĝoj.

Skribinte 'eksterordinaran Esperanto-vivon' ni menciuj kelkajn meritojn de Henning Hauge.

Li lernis la lingvon en 1960 kaj rapide akiris gvidajn postenojn en DEFA, eĉ jam en 1966 li iĝis ties prezidanto, kiun postenon li plenumis dum 20 jaroj, kaj ankaŭ poste oni vokis lin denove gvidi DEFAn. Vicprezidanto de DEA li ankaŭ estis dum periodo, kaj li estis kunaranĝanto de pluraj el la famaj 'arbaraj' jarkongresoj, kiam ni renkontiĝis en relative primitivaj eĵaj cirkonstancoj, sed per malgranda ŝarĝo al la ekonomio de la kongresantoj.

Li ludis gravan rolon en la libertempa laboro de fervojistoj, estis prezidanto de la kultura fako kaj kiel dana reprezentanto en internaciaj rilatoj helpis al la agnosko de Esperanto kiel laborlingvo, almenaŭ en skribaj rilatoj.

En IFEF – Internacia Fervojista Esperanto-Federacio – li jam de la komenco agis kiel delegito, kaj en 1974 li estis elektita kasisto de IFEF, kiun taskon li plenumis dum 28 jaroj.

Kiel vicprezidanto de LKK de la 25a IFEF-kongreso (Århus) kaj LKK-prezidanto de la 37a (Vejle) kaj jubilea 50a (Aalborg) kongresoj li firme gvidis la preparojn al sukcesa disvolviĝo de la aranĝoj.

Internacie li ricevis plurajn honorojn kaj medalojn kaj trifoje la libertempa organizo de danaj fervojistoj honoris lin per medalo.

Deĵore li atingis sufiĉe grandan postenon, kiu permesis al li fari pliajn servojn al la Esperanto-movado, kaj post sia emeritiĝo kaj transloĝiĝo al Norda Germanio li daŭrigis la agadon. Ni nur menciu teknikan redaktadon kaj presadon de Esperanto en Danio kaj Dana Fervojisto. Ĉio kun valora helpo de Sabine.

Esperanto perdis fidelan kunlaboranton en momento, kiam li sentis, ke li rajtas ĝui anstataŭ ĉiam labori kaj servi. Ni humile klinu niajn kapojn honore al la multaj meritoj de Henning Hauge.

### **Ib Sunekær 15.10.1936 - 05.07.2003**

Multe tro frue ni perdis Ib. Dum longa periodo li batalis kontraŭ diversaj malsanoj, kaj fine li do perdis.

Ib kaj lia agado grave influis la lokan Esperantan mondon. Antaŭ multaj jaroj li kun sia edzino Jytte flaris tiun mondon, sed lia unua impresio ne estis favora. Poste li reviziis sian sintenon kaj iĝis tre entuziasma pri ĝi. Dum jaroj li agis en KEK kaj en la fervojista klubo, laste kiel kasisto de KEK kaj librovendanto de DEA.

Liaj ĉiamaj kaj multflankaj agadkampoj rezultigis respekton. Neniam li rifuzis labori, ĉu temis pri gvidado de komunaj kantoj, pri voĉlegado, pri kunven-gvidado, pri librovendado, pri surbendigo por blinduloj de magazinoj, pri ĉiĉeronado – aŭ pri kio ajn alia.

Ankaŭ lia heroa batalo kontraŭ la kreskanta malsano estis admirinda, kaj ĝis lasta spiro li ŝajne konservis optimismon kaj vivkuraĝon. DEA perdis 'fajran animon'!

Al edzino Jytte kaj filino Eva ni kore kodolencas.

*E. Henning Olsen*

## Letero de unuafoja kongresano

La unua fojo en Universala Kongreso estas vere nekredebla travivaĵo, kiun oni ne povas priskribi per malmultaj vortoj. Kiam oni nur estas apenaŭ du jarojn aĝa kiel esperantisto, oni spertas ke ankoraŭ iomete mankas la lingvoscio por havi maksimuman gajnon. Kelkaj horoj en salono kune kun interalie du profesoroj sur la podio, kiuj kune kun la publiko diskutas la kongresan temon “lingvaj rajtoj kaj respondecoj”, postlasas vin en certa lingva humileco.

Estis amuzaj momentoj rigardi kiam granda amaso da kongresanoj, iomete malfruiĝintaj, kuregis en ŝajne neregebla konfuzo ĉiudirekten tra la granda centra halo en la kongresejo, “Placo Esperanto” – miraklo ke ne okazis seriozaj trafikaj akcidentoj!

Estis ankaŭ momentoj de profunda intenso kaj tensio, kiam la direktoro de la Centra Oficejo Trevor Steele invitis la antaŭan direktoron Osmo Buller sur la tribunon. Osmo Buller diris interalie: “Mi volas uzi la okazon por deklari mian solidarecon kun la nuna stabo de la Centra Oficejo”, kaj li finis kun la vortoj: “Vivu la Centra Oficejo!” En tiu momento mi spertis kaj kredis, ke esperantistoj malgraŭ ĉiuj disputoj, estas samideanoj.

Ja oni devus esti pli ol ordinara cinikulo kaj oportunisto, se oni ne spertas profundan senton de interrilato kun kaj amo al nia lingvo, kiam la plenplena kongresejo kantas nian himnon “La Espero” de Zamenhof.

Mia konsilo: se vi ankoraŭ neniam partoprenis en Universala Kongreso – nepre faru tion! Se ne en Pekino en 2004, do ĉiaokaze en 2005 en Vilnius.

Do, ĝis revido tiam, karaj samideanoj.

*Arne Casper*

## Komitatanaj impresoj pri la UK

Dum mia esperanta vivo mi multfoje kongresis, sed tiu ĉi estis la unua fojo ke mi partoprenis kiel membro de la Komitato, kie mi reprezentas DEA. Emociige estis trovi sin antaŭ 1800 kongresanoj, salutante en la nomo de nia landa asocio. Mi havis ankaŭ la ĝojojn saluti nian multnombran danan grupon. La 88-an UK partoprenis entute 51 danaj esperantistoj.

Du monatojn antaŭ la kongreso mi ricevis dikan stokon da dokumentoj, kiujn mi scivoleme kaj atenteme tralegis, preparante min al mia nova tasko kiel komitatano. Dum la kongreso mi povis konstati, ke mi neniam antaŭe partoprenis en tiom multnombraj kunvenoj, eĉ se la mirinde bela vetero allogis al eksteraj aktivecoj, ĉar dum la kongreso okazas la ordinara ĝenerala kunveno de la Komitato de UEA. La kunveno konsistas el du kunsidoj: la unua sabate, kaj la dua la sekvontan vendredon. Inter tiuj kunsidoj la komitatanoj kunvenas en subkomitatoj, kie oni diskutas kaj proponas solvojn, kiujn oni proponas al la ĝeneralkunveno.

Estis planitaj kunvenoj de 8 subkomitatoj: kulturo, eksteraj rilatoj, financo kaj administrado, edukado kaj instruado, informado, landa kaj regiona agadoj, scienca kaj faka agadoj, junularo. Du el la plej gravaj estis tiu pri financo kaj administrado kaj junularo, dum kiu oni fondis laborgrupon kies celo estis esplori, difini kaj priskribi kion oni atendas de la Centra Oficejo.

La ĝenerala kunveno akceptis la proponon uzi 300.000 eŭrojn por plibonigo de la sidejo de UEA en Rotterdamo. La fizika plibonigo de la oficejo alportos plibonigon de servoj de la Centra Oficejo ĝenerale, sed ankaŭ rilate al TEJO, kiu komence postulis ekhavi propran oficiston, sed prudente akceptis atendi la reorganizon de la laboro en Centra Oficejo.

Alia pozitiva sperto estis vidi Osmo Buller partopreni aktive en pluraj kunvenoj, precite en tiu de la Centra Oficejo, kie li interalie rimarkis ke laŭ lia sperto, la elspezoj de UEA bilancos se la membro-nombro estos 8000 individuaj membroj. Mia opinio estas ke ĉiuj landaj asocioj kaj kluboj – la fundamento de UEA – devas klopodi

por helpi, varbante novajn membrojn. Ankaŭ ni en Danio havas gravan taskon tiurilate, por helpi nian movadon!

La subkomitato pri eksteraj rilatoj rekomendis interalie ke UEA kandidatiĝu al la Unesko-pacpremio, kaj ke la Universala Kongreso de Esperanto kandidatiĝu por esti agnoskita kiel Nemateria Kultura Heredaĵo de Unesko.

TEJO faris proponon ke la estraro de UEA ĝis la venonta Komitatokunsido esploru la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de propra jura personeco de TEJO, same kiel manierojn por akiri ĝin, kun minimuma ŝanĝo de la nunaj rilatoj inter TEJO kaj UEA. La ĝenerala kunveno decidis plialtigi venontjare la UEA-kotizon je 4 eŭroj.

Fine oni ricevis proponon de 2 landoj kiuj invitas al UK: Italio por 2006 (Firenze) kaj Japanio por 2007. Oni decidis pri tio post pritrakto de la eblecoj en la menciitaj urboj fare de la ĝenerala direktoro Trevor Steele.

*Ileana Schröder*

## **La Komunikadcentro bezonas vian helpon!**

Dum la Zagreba UK 2001, la Komitato de UEA pritraktis proponon nome de Europa Esperanto-Unio (EEU) ke oni starigu la Bruselan Komunikadcentron (BKC) kaj finance subtenu la projekton dum du jaroj. Tiun Komitatan rekomendon la Estraro pozitive traktis kaj akceptis, kondiĉe ke UEA rajtos uzi la Centron por informaj laboroj spefice por UEA. En aprilo 2002 Dafydd ap Fergus fariĝis dungito kaj ekde 2003 Marko Naoki Lins fariĝis staĝanto.

Post unu kaj duona jaroj da agado estas videblaj pluraj konkretaj rezultoj. La BKC regule dissendas profesie verkitajn artikolojn kaj gazetarajn komunikojn al diversaj retlistoj. Videblaj rezultoj sekvis en la formo de artikoloj publikigitaj en gazetoj en dekoj da landoj. La celo de la komunika agado estas reliefigi la politikan kaj socian signifon de Esperanto, sekve de la konstato ke esperantistoj jam regule sukcesas interesi ĵurnalistojn pri grandaj Esperanto-eventoj.

Ĉi-jare BKC kunordigis por UEA ampleksan gazetaran agadon ĉirkaŭ la Universala Kongreso, kiu ofertas eblecon varbi pri Esperanto en plej diversaj landoj de la mondo, per lanĉo de artikolo. Je la fino pretis 27 lingvoversioj de la artikolo. La artikoloj aperis en 16 landoj.

Sed la problemo nun estas trovi financajn rimedojn por daŭrigo de tiu laboro en 2004, ĉar UEA ne povas daŭrigi sian subtenon. La eŭropaj landaj Esperanto-asocioj (inter ili DEA) kiuj estas membroj de EEU pagas kotizon al EEU, kaj la kotizo iras al la laboro de BKC; sed tiuj rimedoj bedaŭrinde ne estas sufiĉaj. Tial la kasisto de EEU sendis peton al ĉiuj unuopaj esperantistoj helpi finance la BKC, kaj la prezidantoj de EEU kaj UEA apogas tiun peton, ĉar tiuj du organizoj kredas, ke la pluvivo de BKC en 2004 estas necesa por asisti kaj vigligi la Landajn Asociojn en ilia informado pri egalrajteca traktado de la lingvoj en Eŭropo kaj pri Esperanto.

**Oni petas fari donacon de almenaŭ 0,5% de sia jarenspezo, (sed eĉ kia ajn donaco estas bonvenigita). Oni petas sendi la monon al sia landa kasisto, do ĉe ni al Ina Schultz pere de ĝirokonto 805-7370, skribante: por BKC. Oni devas pagi la sumon antaŭ la 1. de oktobro. Se BKC ne pluvivos dum 2004, tiu sumo estos repagita en 2003. Se male ĝi sukcesos pluvivi, la donacintoj ricevos en 2004 la revuon La Ondo de Esperanto. (Se oni jam ricevas ĝin, oni povas aboni al alia Esperanta revuo).**

*Ileana Schröder*

## **Lingvo, politiko kaj kulturo**

### **La diskutoj en la Universala Kongreso**

La kongresa temo, “Lingvaj rajtoj kaj respondecoj”, estis traktita en tri grandaj kunvenoj kiuj altiris multe da intereso. Humphrey Tonkin tre kompetente gvidis la tutan aferon, kaj Probal Dasgupta rolis kiel sekretario, kio certe ne estis facila tasko.

La kunvenoj estis organizitaj kun enkondukaj prelegetoj, diskuto en pleno, diskuto en grupoj, kaj prezento de la rezultoj de la grupaj diskutoj. La temo ne nur interesas multajn esperantistojn kiuj havas plej diversajn opiniojn pri ĝi, sed ĝi estas ankaŭ tre kompleksa en si mem. Tial Tonkin kaj Dasgupta, kun la gasto Jean Durand, estis el-laborintaj 17 demandojn por iom fokusigi la diskuton. Ĉiu el ili faris ĝeneralan enkondukan prelegeton pri la temo en la unua kunveno, kaj la duan enkondukis Anna Ritamäki parolanta pri la jura aspekto de lingvaj rajtoj, Amri Wandel pri la komunika problemo en scienco, kaj Michael Cwik pri la lingva problemo en la organoj de EU.

En la tria kunveno oni klopodis resumi la rezultojn de la du unuaj, kaj en kvara kunveno nur por la volontulaj grupgvidantoj (el kiuj mi estis unu) oni skizis la kongresan rezolucion. La finan vortigon prizorgis malgranda grupo, konsistanta almenaŭ el Tonkin, Dasgupta kaj Brian Moon. La rezolucio esence diras ke Esperanto necesas se la mondo estu ne nur multlingva, sed ankaŭ demokratia. La tuta teksto estas legebla en lasta numero de la kongresa Kuriero (reta versio ĉe <http://www.uk-2003.net>).

## **Simpozio trans kulturajn limojn**

Tuj sekve al la Universala Kongreso de Esperanto okazis dulingva (Angla-Esperanta) serio de sciencaj prelegoj en la Gotenburga Universitato sub la titolo “Simpozio pri interkultura komunikado / Symposium on Communication Across Cultural Boundaries”, iniciatita de la Akademio de Esperanto. La programo estis kunmetita de komitato sub la prezido de Christer Kiselman, profesoro pri matematiko en Uppsala kaj membro ne nur de la Akademio de Esperanto, sed ankaŭ de la Reĝa Sveda Akademio de Sciencoj. Honora prezidanto de la program-komitato estis prof. Sture Allén, membro kaj antaŭe multjara sekretario de la Reĝa Sveda Akademio.

Oni cetere notu ke temas pri du malsamaj akademioj: la Reĝa Sveda Akademio donacas la Nobel-premion pri literaturo, dum la Reĝa Sveda Akademio de Sciencoj tiujn pri fiziko, kemio kaj ekonomiko. La Nobel-premion pri medicino donacas *Karolinska Institutet* (ĉefa Sveda medicina universitato), kaj tiun pri paco la Norvega parlamento (ĉar la Norvega ŝtato tiutempe estis parto de la Sveda) – kaj la Nobel-premio pri ekonomiko tute ne estas premio fondita de Alfred Nobel mem, sed premio fondita memore al li!

Tiu tuta komplikeco tamen ne ĝenis la Simpozion, kiu estis mirinde sukcesa: la prelegoj estis je plej alta nivelo, la aŭskultantoj vigle demandis post ĉiu prelego, kaj homoj agrable konversaciis dum la paŭzoj. Eĉ la manĝoj estis senpagaj, ĉar la Sveda Akademio finance apogis la Simpozion. Estis 11 prelegoj (plus unu afiŝita, ĉar ne estis tempo), plejparte en Esperanto, sed tri estis tute en la Angla. Tio ne detruis la bonan etoson, eble ĉar la Anglalingvaj prelegantoj ĉiuj estis Svedoj. Okazis tre malmulte da interpretado, sed la kelkaj kiuj

disdonis notojn, liveris ilin en Angla-Esperanta versio (unu eĉ ankaŭ en Franca).

La antaŭliveritaj resumoj ankaŭ ĉiuj estis dulingvaj, kaj ili estas legeblaj ĉe la retpaĝo de la Simpozio (en la retejo de Kiselman):

<http://www.math.uu.se/~kiselman/sik2003eo.html>.

Pli detalan priskribon de tio kion mi persone profitis el ĉiu el la prelegoj, oni povas trovi en la retĵurnalo Libera Folio:

<http://www.algonet.se/~kallekn/folio/>.

*Jens S. Larsen*

## **Travivaĵoj en fervojista kongreso**

Kutime mi almenaŭ unufoje jare partoprenas Esperanto-aranĝon eksterlande. La kialoj estas multaj, sed ju pli da esperantistoj kune, des pli da ĝojo.

Kvankam mi ne estas fervojisto, mi havas plurajn fervojistajn amikojn kiujn mi antaŭ multaj jaroj renkontis en IFEF-skisemajno. Tiajn valorizaĵojn ankaŭ estonte mi volonte flegos. Jam la komuna vojaĝo de Kopenhago al Dresdeno kaj reen, ĉefe kun IFEF-anoj estis tre agrabla.

La IFEF-kongreso kun siaj ĉirkaŭ 300 partoprenantoj el pli ol 20 landoj, ebligis al mi renkontiĝi kun multaj konatuloj, amikoj kaj hazardaj lokaj homoj. Kiam mi babilis kun mia edzo en kafejoj, oni interesiĝis pri la aŭdata sed ne komprenata lingvo. Mi klarigis ke ni estas internacia geedza paro, kaj ke nia komuna lingvo estas Esperanto. Unu de la interesitoj volis scii, kial ni vizitas ĝuste Dresdenon, kaj tio donis al mi okazon, rakonti pri nia Kongreso. La Esperantaj konatuloj kaj kelkaj amikoj nun staris vid-al-vide, kaj ni kompreneble interŝanĝis kelkajn pensojn pri la kongreso, niaj travivaĵoj en la urbo kaj rakontis pri nia ĉiutaga vivo. Estis fakte du kongresejoj, tamen proksime unu al la alia.

Krom la abunda distra programo en nia kongresejo, mi ankaŭ partoprenis ekskurson. Ĝi estis aranĝita por homoj kun reduktita paŝad-kapablo. Mi ĉeestis ĝin ĉar mi, kompreneble, akompanis mian edzon. La ĉirkaŭaĵo de Dresdeno estas impona, precipe pro la belega



naturu kaj pluraj kasteloj, iamaj reĝaj rezidejoj. Ĉe la reveno al Dresdeno, nia ŝoforo fiere montris al ni sian naskiĝurbeton kaj li busveturigis nin tra la Zamenhofa strato.

Mi vizitis Dresdenon, la ĉefurbon de Saksio, situantan en la larĝa valparto de Elb-rivero. Per la turisma buso mi trairis la malnovan ponton kaj piede promenis admirante ĝiajn muzeojn, preĝejojn, placojn kaj kafejojn. Mi longe staris antaŭ la bildo, Madona de Siksto (Sixto) kun 2 ĉarmaj anĝeloj. Mi vizitis muzeon de Albertino (Albertinum) kun diversspeca arto, tiel nomata "Verda Remparo" (Grüne Gewolbe), kun la juveloj kaj diversaj aĵoj de Regnaj tempoj. La malnova urbo ekfloris ĉefe sub la regno de Aŭgusto la Forta. Ĝi estas impone bela baroka urbo.

Mi promenis tra la fama fortikaĵo de Cvinger (Zwinger) , eniris Semper Operon kaj poste grimpis barokajn ŝtuparojn por alveni la terason de Bruhl (Bruhlsche Terrasse) de kie mi havis belegan panoramon.

Multaj famaj homoj naskiĝis en Dresdeno. Mi menciis kelkajn de ili: Frederiko Ŝiler, Erik Kestner, Karl Maj kaj kompreneble, Joachim Giessner, IFEF prezidanto.

La urbo Dresdeno suferis plurfoje en la pasinteco. La dua mondmilito faris gravajn detruojn kaj kelkaj el ili videblas ankoraŭ. Ruino de la Virgulina preĝejo estas nur unu ekzemplo de tiama detruo. Ĝi detruigis en februaro 1945 pro varmego , sekve de brulbomba fajro.

Inundo en la jaro 2002 kaŭzis multajn damaĝojn. Oni ankoraŭ vidas striojn sur loĝejaj muroj kiuj montras la tiaman akvo-nivelon.

Miaj travivaĵoj fariĝis neforgeseblaj. La urbo ĉiam rezistis atakojn kaj minacojn, sed spite al ĉio, hodiaŭ ĝi povas fieri pro sia beleco.

*Ana Røssum*

## Kopenhago

### ***La Fonduso Esperanto-Domo***

En 1943 la prezidanto de KEK (Konversacia Esperantista Klubo en Kopenhago) Gustav Kühlmann iniciatis "Fondaĵon por starigo de Esperanto-Domo". Dekomence la Fondaĵo estis memstara entrepreno, kiu nur pro praktikaj kaŭzoj – reviziado de la bilanco kaj elektoj de membroj al la komitato de la fondaĵo – havis rilatojn al KEK. Nun, sesdek jarojn poste, la kapitalo sumiĝas je 640.648,66 danaj kronoj (stato je la 1. de januaro 2003).

Kelkaj fidelaj esperantistoj dum jaroj donacadis iom da mono por ĝi, kaj en la sepdekaj jaroj oni aĉetis lokalojn por la Esperanto-Domo (nemovebla kapitalo de la Fonduso), en Rosenørns Allé 44 en la komunumo de Frederiksberg.

La Fonduso estis registrita kaj administrata de la Ŝtato, kaj la donacintoj havis deprenon de la impostoj. Tiu imposta avantaĝo ĉesis en la jaro 1987, kaj de post tiam la Fonduso pagas imposton. La kaŭzo de la subita ŝanĝo ne estas tute konata. Supozeble temis pri la ĝenerala ŝanĝo de la Fondusaj leĝoj unuflanke, kaj aliaflanke ke Esperanto-Domo ne kapablis adaptiĝi je tio.

Esperanto-Domo malfermis sian pordon al ĉiuj interesitaj pri Esperanto, sed ankaŭ servis por la kunvenoj de KEK.

En la naŭdekaj jaroj pro la malfavora konjukturo kaj falado de rentoj, la elspezoj preskaŭ supersaltis la enspezojn, kaj tio devigis la tiaman Estraron vendi la lokalojn. La vendo okazis en 1999.

Okaze de donackontribuo en 1998, la tiamaj Estraro eksciis ke Esperanto-Domo ne estas "vera" fonduso, ĉar ĝi rilatas al la klubo KEK. Tiam estis necese ankoraŭfoje decidi, ĉu sendependigi la Fonduson kaj ankaŭ pri ĝia nomo. Por esti certa ke la kapitalo ankaŭ estonte servu la celon, la Estraro decidis ke estu vera Fonduso. La tiamaj 3-persona Komitato plivastiĝis al 5-persona Estraro. La Estraro decidis forigi la dubon pri influo de KEK, sed eĉ ŝanĝo de la Statuto

en la jaro 2000 (ne ŝanĝanta la originan celon), ne konvinkis la ŝtatan administracion pri memstareco de la Fonduso.

Laŭ la opinio de Civiljura Direktorato kaj la Impostaj aŭtoritatoj, paragrafo 3 en la Statuto ne sufiĉe klare difinas ĝin kiel "Ĝenerale utila Fonduso".

La nuna Estraro en februaro 2003 reformulis la paragrafon kaj pro tio ankoraŭfoje ŝanĝis la Statuton, sen ŝanĝo de la origina celo.

La Estraro strebas al **"Ĝenerale Utila Fonduso"** kaj estas sur bona vojo baldaŭ realigi tion. "La Ĝenerale Utila Fonduso" donus plurajn avantaĝojn, kiel ekzemple:

**Ŝparo de impostoj unuflanke, kaj impostdeprenoj por estontaj donacintoj, aliflanke.**

Nun restas al ni revo kaj espero ke ni ne atendu tiom da jaroj por povi aĉeti taŭgajn ejojn kaj per tio, unue, protekti la heredaĵon kaj due, pli profesie disvastigadi Esperanton.

*Ana Røssum  
Prezidanto de la Fonduso*

## ***Invito al kopenhagaj prelegoj***

La Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo (KEKG) denove lanĉas serion da prelegoj. Ni esperas, ke niaj aranĝoj povos allogi Esperanto-parolantojn en Kopenhago kaj el la Sunda regiono. La aranĝoj okazos unufoje monate kaj ili povos funkcii ankaŭ kiel sendependa loko por ĉiuj Esperanto-parolantoj en la regiono.

Kiel kutime, post ĉiu prelego oni povas fari demandojn al la preleginto, kaj post tio estas libera interbabilado en Esperanto. Ni ankaŭ ne forgesos oferti teon, kafon, kaj kukon, kiujn oni povas ĝui metinte 10 kronojn en la tiucelan kason. La prelegoj okazos en la kutima loko en la Civitana Domo de Frederiksberg, atingebla per buslinio 29 el stacio Vesterport al haltejo Danas Plads, aŭ per la metroo el Nørreport ĝis la stacio Forum, kie vi devas iri laŭ Julius Thomsens Plads (ĉ. 300 m) ĝis Danasvej 30B.

*KEKG: Lis Thune, Eugeniusz Rybarczyk, Torben Svendsen*

## ***Kopenhagaj kunvenoj dum aŭtuno 2003***

KEK (Kopenhaga Esperanto-Klubo) kaj DEFA (Dana Esperanto-Fervojista Asocio) kunvenas en *Banestyrelsen, Vasbygade 10*, ĉiun lundon. Ĉiufoje kun retbabilejo ekde 19.00 kaj programo inter 20.00–21.45, unufoje monate kun komuna manĝo kaj librovendado ekde 18.00 (buterpanoj mendeblaj ĉe Ruth, tel.: 36 46 62 79). Por eniri, uzu la sonorilon ĉe la pordego. Kontaktuloj: KEK ĉe Jytte Sunekær, ☎ 44 48 47 26, ✉ [jytte.sunekaer@mail.tele.dk](mailto:jytte.sunekaer@mail.tele.dk). DEFA ĉe Astrid Birkbak, ☎ 44 97 43 29.

KEKG kunvenas unufoje monate en la bibliotekaj lokaloj ĉe *Danasvej 30 B*. La pordoj estos malfermitaj inter 19.00–23.00; ĉiu prelego okazos inter 19.30–20.30. Ĉiuj programoj okazas ekskluzive en Esperanto. Kontaktulo: Torben Svendsen, ☎ 38 74 97 64, ✉ [tsv@vip.cybercity.dk](mailto:tsv@vip.cybercity.dk).

### ***Aŭgusto kaj Septembro***

KEK/DEFA lunde, 25.08.2003, 20.00–21.45: Karen Olsen distros nin per taskoj pri la naturo.

KEK/DEFA lunde, 01.09.2003, 18.00–21.45: komuna manĝado kaj librovendado. Poste detala raporto pri la okazaĵoj dum UK en Gotenburgo.

KEK/DEFA lunde, 08.09.2003, 20.00–21.45: informa vespero pri la venonta vintra sezono. Prezento de kursoj, studgrupoj, instruantoj kaj gvidantoj.

KEKG merkrede, 10.09.2003, 19.30–20.30: **Komunaj taskoj kaj problemoj en la dana Esperanto-Movado.** Venu al konstruktiva debatvespero pri la temo por ĉiuj kun intereso pri la Esperanto-vivo kaj kulturo en Danio. Enkonduke parolos Ileana Schröder, Lis Thune, Bent Wiinberg kaj Torben Svendsen.

KEK/DEFA lunde, 15.09.2003, 20.00–21.45: Ni spektos epizodon el la televida serio "Esperanto - hvem er det?"

KEK/DEFA lunde, 22.09.2003, 20.00–21.45: Ni spektos epizodon el "Esperanto - hvem er det?" kaj poste diskutos.

KEK/DEFA lunde, 29.09.2003, 20.00–21.45: Komenciĝas la kursa kaj studa sezono en Vasbygade 10 (vidu ankaŭ 08.09 supre).

## *Oktobro*

KEK/DEFA lunde, 06.10.2003, 18.30–21.45: komuna manĝado kaj librovendado. Poste prelego de Jens S. Larsen: **La origino de la homo**. Ĉi tiu temo estas aparte interesa por esperantistoj pro la rilato inter la origino de la homo mem kaj la ekesto de lingvo. Ne maltrafu la okazon orientiĝi pri la plej novaj malkovroj tiukampe.

KEKG, merkrede, 08.10.2003, 19.30–20.30: **Mia vivo en Belgio interalie kiel interpretisto en Bruselo**. Prelego de Eliza Kehlet.

## *Novembro, Decembro*

KEKG, ĵaŭde, 13.11. 2003, 19.30–20.30: **‘Zinaan Ek’ – iom da astronomio kaj stelfolkloro pri la konstelacio de ‘Skorpio’**. Baznivela astronomia prelego de Mogens Rude Andersen, kun abunde da ilustra materialo.

KEKG, merkrede, 03.12.2003: **La povo de la penso**. Prelego de Ole Therkelsen.

KEKG, sabate, 13.12.2003: Zamenhof-vespero. Detala programo aperos aŭtune 2003.

## ***Budo en la karnavalo***

Ĉi-jare denove ni havis por la kvara fojo budon en la Kopenhaga Karnevalo dum la pentokosto. Proksimume 20 esperantistoj jen helpis, jen vizitis la budon aŭ la koncerton de Esperanto Desperado.

Esperanto Desperado koncertis dufoje dum la dimanĉo. Unue en grandega tendo elektre, poste en malgranda, intima, irana tendo akustike. Estis du tre diversaj koncertoj, precipe la lasta finiĝis kun tre granda entuziasmo de la publiko, kaj pluraj aĉetis la kodiskon de la bando.

La sola iom domaĝa afero estis ke ni havis tro malmulte da flugfolioj, nur 600 el la kutimaj 3 aŭ 4 miloj. Tio bedaŭrinde ne sufiĉas kiam estas preskaŭ 100.000 homoj.

Tamen per bonaj grandaj ŝildoj kaj la koncertoj mi pensas ke ni kaptis la atenton de la homoj, montrante ke Esperanto ekzistas kaj ke estas eĉ kelkaj kiuj ĝin uzas. Pluraj estis interesitaj kaj ni eĉ vendis lernolibron.

*Kim J. Henriksen*



*Kim antaŭ la tendo en la karnavalo*

---

## Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Fyrrevænget 4, 4700 Næstved,  
☎ 55 72 12 40, rete atingebla pere de: [eho-esperanto@stofanet.dk](mailto:eho-esperanto@stofanet.dk)  
La kunvenoj okazas en *Grønnegades Kaserne, Grønnegade 10, lokalo 111*, ekde 19.30.

Provizora aŭtuna programo:

Vendrede 26.09: Komenciĝo de traduklaboro pri H.C. Andersen.

Vendrede 03.10: La prezidanto de DEA, Ileana Schrøder, levas la vualon pri planoj de DEA kaj de UEA.

Vendrede 10.10: Someraj travivaĵoj.

Vendrede 17.10: Traduklaboro pri HCA.

Vendrede 24.10: Sisse Gry Olsen rakontas en la dana pri sia laboro inter stratinfanoj en Bolivio.

Vendrede 31.10: Traduklaboro pri HCA.

Vendrede 14.11. Traduklaboro pri HCA.

Vendrede 21.11. Traduklaboro pri HCA aŭ danlingva prelego.

Vendrede 28.11. Eventuale danlingva prelego.

Vendrede 12.12. Kristnaska aranĝo.

# Århus

Prezidanto: Stanisław Mielczarek, ☎ 86 29 23 06,

✉ [stanis@psy.au.dk](mailto:stanis@psy.au.dk).

Kunvenejo: Senior-Centret, Østergade 30, 2., 8000 Århus C.

Kunvenoj: je la 19.30 h.

La ĉi-jara bela kaj varmega somero deaktiviĝis nin ĉiujn. Tamen ni memoru pri Esperanto, pri Esperanto-kluboj, sen kiuj la lingvo kaj belega Zamenhof-ideo ne povus disvastiĝadi.

Arhusa Esperanto-klubo bonvenigas la novan estraron de Dana Esperanto-Asocio! Ni deziras al ĝi fruktodonan laboron por la Internacia Lingvo.

## Okazos:

25.09: "Mia ferio" – ĉiu el ni rakontas pri sia ferio.

**30.10: Ileana Schröder**, la nova prezidantino de Dana Esperanto-Asocio vizitos nian klubon! Venu do, por ekkoni la prezidantinon, ŝiajn planojn pri Esperanto movado en Danlando ktp. Ĉi-vespere ni havos ankaŭ eblecon por esprimi niajn opiniojn, dezirojn pri Esperanto-movado en nia lando, doni konsilojn ktp.

27.11: Kio (kiu?) instigis vin lerni Esperanton kaj ĉu vi kredas je ĝia estonteco?

11.12: Zamenhof-festo.

## Okazis:

22.05: La temo de tiu vespero estis "Ciganoj en Pollando". Tamen Stanisław Mielczarek enkondukis nin en la historion de romaoj ĝenerale. Li rakontis, ke romoj (ciganoj) devenas el la norda parto de Hindujo. Ilia migrado al aliaj partoj de la mondo komenciĝis antaŭ pli ol mil jaroj. Oni nomas ilin diverse en diversaj landoj. Esperante ni nomas ilin "ciganoj", pole – "cyganie", sed tion ili ne ŝatas, ĉar tiu vorto devenas de la pola "cyganić", kio signifas "mensogi".

Ili preferas, ke oni nomu ilin "romaoj". "Rom" signifas "homo" en ilia lingvo "romanes" ("romani"). Tiu lingvo funkcias kiel iuspeca Esperanto por romaoj. Pro tio, ke ĝi estis nur parola lingvo, ĝi estas

diversa en diversaj landoj. Nur antaŭ nelonge oni komencis krei skriban lingvon.

La prelego estis ilustrita per foliogramoj kaj videofilmo.

07.06: Okazis nia tradicia somera ekskurso. Ekde lastjare ni kunlaboras kun la klubo en Aalborg, tiel ni estas pli da partoprenantoj. La celon de nia ekskurso proponis Inna Busck kaj Gert Pedersen el Hvorum apud Hobro. La vetero estis bela, tial des pli ni ĝuis la ŝipveturadon Hobro-Mariager-Hobro per malnova pramo "Svanen".



*Somera ekskurso 2003. Antaŭ la ŝipveturado Hobro-Mariager-Hobro.*

La agrablan ŝipveturadon plezurigis muzikantoj - Gert Pedersen ludante per segilo kaj lia bofrato per akordiono. Ankaŭ la junaj Jonas kaj Mathias Dalmose kontribuis. Lunĉante je la pramo ni povis ĝui belajn vidindaĵojn. Post la reveno al Hobro ni trinkis kafon en la havena kafejo kaj intertempe foraŭkciis Esperantaĵojn, kiujn postlasis iu el la lokaj mortintaj esperantistoj. Finfine ni alvenis al la hejmo de Inna kaj Gert. Ĝi estis vere rigardinda.

Ni ĉiuj estis treege kontentaj pri la ekskurso. Koran dankon al Inna kaj Gert! Koran dankon ankaŭ al Jonas kaj Mathias Dalmose por bona muziko en la domo de Inna kaj Gert!



## Postkongresaj gastoj



*Antaŭ la Marselisborg-kastelo. Bedaŭrinde  
la dana reĝino estis aliloke.*

La plej multaj eksterlandanoj vizitas la ĉefurbon de Danlando – Kopenhagon. Nur malmultaj pensas pri la ĉefurbo de Jutlando – Århus. Tamen, la trian de aŭgusto, survoje el Gotenburgo al Groningen, vizitis nin du nederlandaj samideaninoj. Unu el ili, s-anino Wil van Ganswijk-Vlasblom, prelegis antaŭ iom da jaroj en kelkaj danaj Esperanto-kluboj. Nia klubo ne aktivis en aŭgusto, do Stanisław Mielczarek gvidis la gastojn al kelkaj vidindaj lokoj de Århus, al la fleghejmo, kie nun loĝas nia honora membro Jenny Jørgensen, por finfine eksidiĝi kune ĉe la kafotablo ĉe ĉiam gastamaj Gunhild kaj Hans Halager.

*Stanisław Mielczarek*

Mi nomiĝas Eric kaj loĝas en Belgio. Mi estas 18-jara studento parolanta la francan lingvon. Mi deziras korespondi kun homoj el Danlando. Mi lernas Esperanton de post kelkaj monatoj. Multan dankon. Mia adreso estas:

Eric Decaps  
Rue Albert-Elisabeth, 300  
7134 Péronnes (Binche)  
BELGIO

## Anoncoj

**“Kosmo-espero”**: Interreta stud- kaj debatgrupo en Esperanto pri LA SPIRITA SCIENCO de Martinus ("La Tria Testamento").

Temas pri nepublika retpoŝtgrupo por homoj, kiuj jam havas iom da scio pri la Kosmologio de Martinus. Por informoj kaj aliĝo bv. kontakti min retpoŝte: [pdyrholm@get2net.dk](mailto:pdyrholm@get2net.dk) aŭ per la hejmpaĝo <http://hjem.get2net.dk/spiritoscienco-martinus>.

*Poul Dyrholm*

### **39-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO**

MACEIÓ – AL – BRAZILO

de la 18-a ĝis la 22-a de Julio 2004

Temo: “Esperanto en la Lernejo”

Kontaktadreso: AAE – C.P. 396 – Maceió/AL – 57020-970

[ariknubxxi@ig.com.br](mailto:ariknubxxi@ig.com.br) – tel.: (02182) 324-2979

Vizitu: [www.visitealagoas.com.br](http://www.visitealagoas.com.br) kaj [www.maceio40graus.com.br](http://www.maceio40graus.com.br)

**PARTOPRENU! VENU KONGRESI KUN NI!**

Estimataj samideanoj!

Ĉu vi volas veni al Brazilo en 2004?

Se jes, vizitu la belan urbon Maceió kaj partoprenu la 39-an Brazilan Kongreson de Esperanto (39-a BKE).

Ne maltrafu la plej grandan Esperanto-eventon en Brazilo!

Venu kongresi kun ni kaj turismi en paradiza loko, sunumi en la belaj plaĝoj kaj boatumi tra lago por viziti naŭ ravajn insulojn, gustumi tropikajn fruktojn kaj manĝi nordorientajn tipajn manĝaĵojn.

**Eksterlandanoj aliĝas senpage.**

Venu! Ni atendas vin! Estu bonvenaj!

Sincere kaj frate,

LKK de la 39-a BKE.

*Aristóphio Andrade Alves Filho*

# Du novaj kompaktdiskoj



Ĝus aperis du kompaktdiskoj kun kelkaj paroladoj/prelegoj de la plej brila oratoro de la Esperanto-Movado iam ajn, nome Ivo Lapenna, mia edzo. Ili estas la unuaj du en planita serio de kvin kompaktdiskoj. Tiuj du konsistas el liaj tri lastaj paroladoj/prelegoj eldiritaj dum la “Internacia Jubilea Esperanto-Konferenco – 100 Jaroj de Esperanto-Kulturo” en Graz, 1987, kaj unu parolado, “Lingva Diskriminacio”, eldirita en Nürnberg en 1964.

Mi estas tre feliĉa, ke la nova tekniko permesas al ni aŭskulti la aŭtentan voĉon de Ivo Lapenna kaj tiamaniere doni al li la eblecon mem prezenti siajn konceptojn, sian sintenon al la Internacia Lingvo kaj siajn konsilojn pri organizado. Per tio, mi esperas, ĉesos la diversaj misgvidaj kaj superflujaj diskutoj pri “lapennisimo” kaj “finvenkismo” kaj similaj strangaĵoj, kiuj nur servas al dispartigo kaj malfortigo de nia Movado.

2 paroladoj de Prof. D-ro IVO LAPENNA (1909 - 1987)  
DISKO I

1.	Esperanto kiel Lingva Esprimo kaj Instrumento de Humaneca Internaciismo. La Festparolado de la Internacia Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz, Aŭstrio, 1987 .....	25:14
2.	Lingva Diskriminacio, Nürnberg, 30.12.1964.....	40:22

Aliaj titoloj en la serio:

DISKO II

3.	100 Jaroj de Parola Esperanto-Kulturo, Graz, 1987.....	51:19
4.	La Parolado dum la Solma Jaŭguro de la monumento "La Esperanto" en Graz, Aŭstrio, 1987.....	10:21

DISKO III

5.	Rokonto al la 100-jara Jubileo de Esperanto, Danio, 12.18.07.1981.....	49:26
6.	La Revolucio de Umeå, Munsterido, 10.12.1954.....	18:05

DISKO IV

7.	Komunikado kaj Homaj Rajtoj, Nederlando, 22.28.07.1984.....	53:59
8.	Kultura Valoro de la Internacia Lingvo La Festparolado de la 39-a UK en Haarlem, 1954 (el gramofondisko).....	06:12

DISKO V

9.	La Juro de Internacia Kollaboro – La Juro de la Internacia Lingvo. La Festparolado de la 49-a UK en Haga, 1964.....	28:36
10.	La Internacia Juro de Edukado. La Festparolado de la 55-a UK en Vieno, 1970.....	24:30

ISBN 87-91376-00-1

Eldonita de *Fondaĵo Ivo Lapenna* -lapenna@mobiliixnet.dk- sub aŭspicio de la Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna, Prez. Prof. D-ro Carlo Minnaja, Italio

Vere bonaj kompaktdiskoj ne facile kreiĝas. La disponeblaj kasedoj ofte ne estas bonkvalitaj. Feliĉe, ke tre kompetenta teknikisto de la Dana Radio estis preta helpi nin. Li sukcesis forigi la plej multon de la bruoj. La tasko tiel multe kaptis lin, ke li spontane diris: “Neniam mi spertis ion similan, kvazaŭ al mi tute nova mondo malfermiĝas”. Li estis ravita kaj de la voĉo kaj de la lingvo.

Tutcerte troviĝas ĉie en la mondo – interalie en Pola Radio kaj en UEA – multaj tre bonaj kaj relative bonaj surbendigoj de paroladoj de Ivo Lapenna. Mi uzas la okazon por demandi, ĉu mi povus prunti ne kopiojn, sed la originalajn kasedojn/bobenojn por prepari novajn kompaktdiskojn. Kompreneble, ke mi resendus la pruntitan materialon. Tiamaniere ni povus konservi la trezorojn por la estonteco.

*Birthe Lapenna*

La kompaktdiskojn eldonas „Fondaĵo Ivo Lapenna“, Grøndalsvej 30, DK-2000 Kopenhago F, Danio, lapenna@mobiliixnet.dk  
La prezo de 1 kd estas 130 dkr. aŭ 17 eŭroj. Afranko: unu/du diskaj en Danio = 15/25 danaj kronoj; en Eŭropo = 3/5 eŭroj; ekster Eŭropo 5/8 eŭroj. Pago pere de banko: Swift-code (rapida kodo) DABADKKK, IBAN n-ro DK 963000 4180-892648.

Returadresse: Ina Schultz, Bredagervej 21, 3.th., 2770 Kastrup

## ***Semajnfina konversacia kurso!***

Kunlabore kun Dana Esperanto-Instituto, DEA aranĝas konversacian kurson, sub gvidado de la fama kursgvidanto **Lars Forsman** el Svedio.



*Lars Forsman*

Praktikaj informoj:

Dato: la semajnfino 10-12 de oktobro 2003

Kursejo: Anna kaj Erik Hansen, Risbjergvej 27, Risbjerg, 4291 Ruds-Vedby (Slando).

☎ 58 26 31 95 ✉ [e-a-hansen@get2net.dk](mailto:e-a-hansen@get2net.dk)

La kursejo estas la privata kaj belega loĝejo de Anna kaj Erik. Ili havas 4-5 dultajn ĉambrojn por ni, do oni verŝajne devos tranokti kun alia partoprenanto. Ni petas vin kunporti viajn litaĵojn. Ni esperas ke la kursanoj pretas kunhelpi pri la praktikaj aferoj.

Alveno: vendrede, la 10-an de oktobro, de la 17.00 horo.

Foriro: dimanĉe, la 12-an de oktobro, posttagmeze.

Kursenhavo: konversacio kaj ekzercado de la lingvo. Oni konversacios nur en Esperanto kaj bonvenaj estas ĉiuj daŭrigantoj.

Prezo: 350 kr. La prezo inkludas instruadon, restadon kaj manĝojn.

Aliĝo: Kiel eble plej frue, pro la limigita nombro de dormlokoj – nepre antaŭ la 15-a de septembro 2003 al DEI:

**Dansk Esperanto-Institut**

**Bente kaj Lars Kromann Jensen**

**Stenbrydervej 6, Værløse, 4640 Fakse**

☎ 56 71 46 51 ✉ [lars.ev@get2net.dk](mailto:lars.ev@get2net.dk)